# DIA REGNO

✶ dumonata kristana revuo en esperanto ✶ n-ro 4 (859) ✶ 2006

DIA REGNO

ISSN 0167-9554







## Kongresaj impresoj



## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;
✆ +31 1724 20222;
💻 e.a.vandijk@hetnet.nl

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- * Membro-subtenanto €30,- * Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- * pagante al Libroservo €18,- * Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. * Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI * Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**



**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Storgatan 6 A,
S 153 30 Järna, Svedio;
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR



Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).



***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***



**Ekspedado:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10
✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron | 75 |
| Kiom kompatema estas la Dalai-lamao | 77 |
| Prelego dum la KELI-kongreso | 79 |
| Impresoj de la KELI-kongreso | 83 |
| Unu aĉa vorto | 88 |
| Denove nin vizitis "Evidente"-anoj | 89 |
| Baltlandaj Esperanto-Tagoj – 42 | 90 |
| Ekumena diservo en Esperanto, dum la Germana Esp. -Kongreso | 91 |
| Ekumena Diservo en Florenco, It | 92 |
| KELI-IKUE kunveno en Florenco, | 93 |
| La profilo – arta estrarano | 94 |
| Selektitaj memortagoj 2006 | 95 |
| Biblio-lingvoj mondvaste | 96 |
| Intervjuo kun s-ro Leen Hordijk | 97 |
| Informetoj | 98 |
| Nekrologo L. v der Pauw-Kuiper | 99 |
| Trans imag' Jesu' amikas | 100 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Tiu ĉi numero estas plena da impresoj kaj memoraĵoj de la someraj kongresoj. Dum la somera libertempo multaj esperantistoj kaptas la eblecon renkontiĝi unu kun la alia. Kaj grandaj kaj malgrandaj kongresoj donas multe da amika reviviĝo kaj lingva praktiko. Tamen mankas al mi impresoj de ekster-eŭropaj renkontiĝoj. Estus interese ankaŭ legi iom pri tiuj okazaĵoj.

Last-tempe mi interesiĝas pri kokoj, kiel vento-montriloj, sur preĝejaj turoj. Sufiĉe kutime en Svedio. Ĉu ankaŭ ĉe vi? Se jes, bonvolu sendi al mi foton aŭ raporton. Ankaŭ aliajn grandajn aŭ malgrandajn interesaĵojn mi volonte publikigos en nia gazeto.

# En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron Gen 1:1

## Prediko dum la KELI-kongreso 2006

Pavel KLIMEŠ, Ĉeĥio

Karaj gefratoj,

La kredo en la Eternulo funkciis kelkajn jarcentojn sen tiuj ĉi vortoj. Dio estis tiu, kiu donas liberecon al la homo, kiu liberigas la homon el la sklaveco de malbono kaj kiu gvidas lin al nova kvalito de lia vivo. La kondukado el Egiptujo kaj la dono de la Libro de instruoj de Moseo – tio estas la unua epoko, tio estas por la homo, kiu kredis, la vera komenco de la historio. La demando pri la komenco de la mondo estis fremda demando por la kredo de la biblia homo.

Ankaŭ Jesuo preskaŭ ne parolas pri la kreo. Nur du aŭ trifoje li diris ion pri la komenco de la mondo.

Interese estas, ke Jesuo en sia parolo pri Dio preferas la titolon Patro, kaj la titolon Kreinto li entute ne uzas.

El tio sekvas: La demando pri la komenco de la mondo ne estas por nia kredo la unua kaj plej grava. Tiun ĉi demandon ni bonvolu lasi trankvile al scienculoj. Ili povas serĉi kaj nuligi siajn hipotezojn, ili povas studadi simiojn kaj aliajn bestojn, kaj la kosmon. Tio estas ilia tasko. La kredo en Dio ne dependas de tio.



Sed post kelkaj jarcentoj tamen, devis la Izraelidoj kun tiu temo batali. Tio estis dum la babilona kaptiteco, kie la Izraelidoj renkontis diversajn teoriojn pri la komenco de la mondo, aŭ pli bone dirante, mitojn kaj fabelojn, kiuj povis priskribi la estiĝon de la mondo. La Izraelidoj demandis tiam: kiel ni kredas? Kiel respondas al tio nia kredo en la Eternulo?

> La Biblio estas literaturo de la kredo. Ĝi ne estas historia priskribo, ĝi ne estas objektiva naturscienca informo, sed ĝi estas alvoko por la koro,

Kaj tiam ekestas konfeso, kiun ni trovas en la unua frazo de la Biblio, la konfeso, kiun eble ĉiuj homoj iam komencis legi, kaj pro kiu multaj legantoj ankaŭ ĉesis la studadon de Biblio.

La Biblio alportas sian raporton, sian konfeson, sed tio estas nek teorio de la estiĝo de la mondo, nek mito kiel fundamento aŭ bazo de la kulto. Tio estas tipa biblia rakonto. La Biblio estas literaturo de la kredo. Ĝi ne estas historia priskribo, ĝi ne estas objektiva naturscienca informo, sed tio estas (kiel biblia rakonto

ĉiam estas) alvoko por la koro: tiel vi povas kompreni vian vivon, tiel vi povas aliri al ĉio, kio estas, tie ĉi kaj nun.

Biblia kreo do ne estas hipotezo de ne konebla procezo, sed tio estas konfeso de la kredo, kiu volas esprimi ion esencan pri via vivo hodiaŭ kaj kiu volas inviti vin al difina maniero de ekzistado.

**"En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron."** En la komenco. Ankoraŭ antaŭ tio, kiam vi naskiĝis. Ankoraŭ antaŭ tiam, kiam ekzemple estiĝis literoj kaj antaŭ tiam, kiam estis eble skribregistri. Ankoraŭ antaŭ ol ĉio ajn, kion mi konas, antaŭ ol ĉio ajn, kion mi kapablas imagi. Min antaŭiras realeco, kiu iras ĉiam antaŭ mi, kiu estas pli granda ol mi mem. Dio estas antaŭ ol nia pensado, antaŭ ol nia racio. Alimaniere mi povas diri: tio, kion ni vivas tie ĉi, tio ne estas el ni, tio ne estas nia merito kaj nia invento. Ni estas parto de io, kio ekzistas ekster ni. Ni ricevis nin mem kaj la tuta mondo, la tuta kosmo ricevis sin mem. Ĉio dependas de ia fonto, ia io, kiu faris, ke io estas kaj estos.

Antaŭ tio, kiam vi komencas ion ajn fari aŭ pensi, vi devas koni, ke ni ne estas ĉefo, nek super ni, nek super aliaj nek super ĉio.

Tia konfeso de la kredo estas limo kontraŭ la homaj malhumilo kaj malkonsidero. Ĉu vi povas, ho homo, konduti kiel senlima suvereno, kiel estro de la vivo kaj centro de la mondo? Ĉu vi volas vivi sen respondeco?

Antaŭ tio, kiam vi komencas ion ajn fari aŭ pensi, vi devas koni, ke ni ne estas ĉefo, nek super ni, nek super aliaj nek super ĉio

Kiam estas parolo pri la komenco de ĉio, estas klare, ke estas parolo pri la komenco de ĉio ĉi en nia nuntempo: do memoru: vi mem, la vivo, la estado estas tio, kion vi ricevis por ia celo. La unuaj aferoj, kiujn vi devas havi en via memoro, estas humileco, dankemo, konscio de donaco. Oni povas en la vivo aŭskulti la voĉon de kreinta donanto, aŭskulti la fonton, kiu estigis nin kaj plu estigos ĉion.

Tiu ĉi "IO", kio estis en la komenco de ĉio, estas laŭ la biblia kredo io, kion estas pli bone nomi "IU". Ĉi io-iu, kiu kreas kaj komprenas. Ĉi io-iu, kiun ni povas aŭskulti, al kiu ni povas krii, kun kiu ni povas havi rilaton.

Ni ne devas aŭskulti tiun kun timo kaj malemo. Ni povas aŭskulti kun fido pro tio ke en la komenco de ĉio, ne staris fizika leĝo, nepersona principo aŭ frenezа duelo de monstroj, dioj kaj diinoj, kiel rakontis babilonaj mitoj.


Nia vivo, nia laboro, niaj planoj kaj niaj intencoj – kaj finfine ankaŭ nia morto – ne staras ĉe la granda nigra truo aŭ sur la sangdueloj de mitologiaj monstroj. En la bazo de nia vivo kaj nia morto staras Kreinto, Donanto, kiun ni povas laŭ ekzemplo de nia Sinjoro Jesuo Kristo nomi: PATRO. Ĉia estado por ni staras en fidema, humila lernemo kaj reciproka amo. Ni povas vivi en espero.

AMEN

# Kiom kompatema estas la Dalai-lamao?

Jaques TUINDER, NL

La karismo de kompatemaj larmoj karakterizas la Ĉefpastron de la Tibeta Budhisma Eklezio, konatan per la titolo Dalai-lamao. Frederiko Lenoir, redaktoro de la franclingva "La Mondo de Religioj" notis el propra sperto admirindan ateston pri tiu granda homo, montrinta solidarecon kun la ĉagreno de sia proksimulo. Li konsolis sen eĉ la plej malgranda emo al konvertado, tiel helpante al li retrovi ĝuste siajn proprajn eŭropajn radikojn.



Unu el la plej gravaj kaŭzoj de la altira forto de la budhismo en la Okcidento oni serĉu en la karisma personeco de la Dalai-lamao kaj en tio, kion li diras pri fundamentaj valoroj kiel toleremo, senperforto, kompato kaj indulgo. Lia instruo fascinas ĉar plene mankas al li konvertemo; tio ja kontrastas kun tio kion ni kutime konstatas ĉe monoteismaj religioj. "Ne konvertu vin al alia religio, ne forlasu tion, kio vi estas", diras la tibeta majstro.

Ĉu tiu dirmaniero estas nur pura ruzaĵo, celanta trompi nin, homojn el okcidento? Tiun demandon oni ofte starigis al mi. Mia respondo estas persona sperto, kiun mi ŝatas rakonti ĉar ĝi profunde trafis min.

Tio okazis antaŭ kelke da jaroj en Hindio, en Daramsalao. La Dalai-lamao estis permesinta al mi unuhoran interparolon cele al la libro, pri kiu mi tiutempe laboris. Tagon antaŭ tiu dato mi havis renkontiĝon en la hotelo kun brita budhano, Petro, kaj lia 11-jaraĝa fileto Joĉjo.

La edzino de Petro antaŭ kelke da monatoj estis forpasinta post longedaŭra kaj dolora malsanperiodo. Joĉjo konigis la deziron renkonti la Dalai-lamaon; sekve Petro skribis leteron, post kio li permesis interparolon kvinminutan. Tiu tempo laŭ li sufiĉis por benopreĝo. La patro kaj la filo estis ravitaj.

Tagon poste la redaktoro havis rendevuon kun la Dalai-lamao; Petron kaj Joĉjon li akceptos post mi. Frederiko ree atendis lin baldaŭ en la hotelo, sed ili alvenis tien nur fine de la tagmezo, tute konfuzitaj. Ilia interparolo daŭradis du horojn! Petro rakontis pri tio la jenon:

*"Komence mi rakontis al la Dalai-lamao pri la morto de mia edzino, kaj mi ne sukcesis bridi miajn larmojn. Li prenis min en siajn brakojn kaj igis min finplori. Tiam li turnis sin al mia filo kaj iom parolis kun li. Poste li demandis kiun religion mi konfesas. Mi respondis al li, ke mi estas judo laŭ deveno, ke mia parencaro pereis en Aŭsviĉo kaj ke mi*

*kiel infano devis kaŝloĝi. Profundaj kordoloroj subite leviĝis en mi, mi emociiĝis kaj denove ekploris. Duan fojon la Dalai-lamao prenis min en siajn brakojn. Mi sentis liajn larmojn kiuj atestis pri kompato; li same laŭte ploris kun mi. Mi lasis min en ĉirkaŭprenado pli longan tempon. Tiam mi ekparolis kun li pri mia spirita vojaĝo. Mi rakontis, ke mi havas neniun emon al la juda religio, ke mi malkovris Jesuon legante la Evangelion, ke mi konvertis min al la kristana kredo, kiu dum dudek jaroj alportis grandan lumon en mian vivon. Poste mi rakontis pri mia seniluziiĝo ĉar en la anglikana eklezio mi ne povis trovi la forton de la mesaĝo de Jesuo. Mi daŭrigis ke iom post iom mi de ĝi malproksimiĝis kaj ke mi eksentis bezonon profundan pri spiritualeco min subtenanta. Tiel mi malkovris la budhismon kiun mi depost kelkaj jaroj praktikis tibetforme. Kiam mi estis fininta mian vivhistorion, la Dalai-lamao sufiĉan tempon silentadis. Post tio li direktis sin al sia sekretario, parolante kun li tibete. Tiu foriris kaj revenis kun ikono, de Jesuo. Mi estis plene mirigita. La Dalai-lamao transdonis ĝin al mi kaj diris: "Budho estas mia vojo, Jesuo estas la via." Tiam mi ploris la trian fojon. Mi subite retrovis mian tutan amon al Jesuo, kiun mi sentis antaŭ dudek jaroj kiam mi konvertiĝis. Mi komprenis ke mi estas ankoraŭ ĉiam kristano. Mi serĉis en la budhismo apogon en la meditado, sed esence nenio trafis min tiel profunde kiel la persono de Jesuo. En malpli ol du horoj la Dalai-lamao repacigis min kun mi mem kaj kuracis min de miaj internaj lezoj. Adiaŭante li promesis al Joĉjo, ke li esperas vidi lin ĉiufoje kiam li vizitos Briton.*

La redaktoro de "La Mondo de Religioj" neniam forgesos tiun renkontiĝon kaj la lumiĝintan vizaĝon de tiu patro kun sia filo, kiuj al li rakontis kiom pura kaj vereca estas la kompato de la Dalai-lamao kaj ke ĝi neniel estas malsupera je tiu de la kristanaj sanktuloj.

ஐ

[La bildo estas senkopirajta el Vikipedio /Red]

**Sankta Luko 17**

20 Kaj kiam la Fariseoj demandis al li, kiam venos la regno de Dio, li respondis al ili, dirante: La regno de Dio ne venas kun observado; 21 kaj oni ne diros: Jen ĉi tie, aŭ: Jen tie! ĉar jen la regno de Dio estas inter vi.

# Estetiko kaj evoluo de la naturobildoj

## Prelego dum la KELI-kongreso

Teksto kaj fotoj: Zoltán SOMHEGYI, HU

Jam en la komenco de mia prelego, mi devas klarigi ĉiujn vortojn en la titolo, kaj tiamaniere malvastigi mian temon.

Multaj filozofoj, natur-teoriuloj kaj eĉ teologoj pensadis jam pri la estetiko de la naturo: pri la beleco trovita *en la naturo*, en la kreitaĵoj, en la delikataj aŭ ektimigaj linioj de montoj aŭ en la maro. En la alia flanko, arthistoriistoj povas prelegi nur pri la estetiko de la *natur-bildoj*, pri la manieroj, kiamaniere ni reprezentas la naturon.

la pejzaĝbildo, kiel aŭtonoma, individua artospeco estas relative juna

En ĉiuj epokoj artistoj faris naturbildojn. Mi intence uzas la verbon “fari“. Kun tiu ĝenerala vorto mi pensas pri diversaj intencoj de artistoj el diversaj periodoj: ĉar la pejzaĝbildo, kiel aŭtonoma, individua artospeco estas relative juna. Antaŭe la naturo sola ne povis esti objekto de bildoj. Plej ofte naturo estis nur indikita kaj havis subordigitan rolon. Iom post iom naturo venkis en la batalo: el la subordigita rolo ĝi atingis la rajton kaj la eblecon de sola reprezentado. Tiun vojon mi ŝatus montri al Vi.

Sed, antaŭe mi faros mian lastan klarigon: en arto ne ekzistas evoluo, almenaŭ ne en la Darvina senco. Arto de la 17-a jarcento ne estas pli bona ol tiu de la mezepoko, kaj Picasso ne estas pli bona ol Michelangelo pro la fakto ke li (Picasso) vivis kvarcent jarojn pli poste. Tiu rilato povas esti nur en la scienco, kiam ni pensas, ke, ekzemple Einstein sciis, aŭ kapablis scii pli multon ol Newton, ĉar ĉiuj scienculoj inter si vastigis la scion pri la fiziko.

En arto ne estas evoluo, kiel ekzemple Giorgio Vasari, la fama kaj eble la unua arthistoriisto pensis en la 16-a jarcento. Ne estas ĝenerala evoluo kiu komenciĝus kun la egiptianoj, kaj finiĝus iam. Kaj ankaŭ la alia pensmaniero ne estas vera, pri la cirkulara evoluo de la arto, ke ekzistus du periodoj kiuj en ripetiĝanta maniero alterniĝus. Membroj de la fama arthistoriista grupo en Vieno (Wiener Schule, ekzemple Heinrich Wölfflin) en la fino de la 19-a jarcento pensis ke klasika, harmonia stilo ĉiam estas sekvata de ne-klasika, senharmonia, “hirta” stilo. Komprenebla ni trovus kelkajn ekzemplojn: klasikan grekan skulptarton kontraŭ hellenismo, renesancon kontraŭ baroko, klasikismon kontraŭ romantikismo, sed ni (aŭ minimume mi) ne povas akcepti tiun pensadon kiel ĝenerala leĝo.

en arto ne ekzistas evoluo, almenaŭ ne en la Darvina senco

Do kial mi elektis la vorton "evoluo", se mi ne akceptas ĝin en la arto? Ĉar tio ekzistas, ne ĝenerale en la arto, sed en specifaj kazoj. Ekzistas evoluo en la *maniero* de prezentado. Oni povas diri, ke en la arto ĉiam estas taskoj, problemoj, kiuj devas esti solvitaj de artistoj. En tiu senco estas evoluo; evoluo de teknikoj, prezentad-manieroj, solvoj, sed ne evoluo de la spirito de arto. La spirito, do, la arto mem nur ŝanĝiĝas. Ekzemple grekaj arkitektoj ne sciis kiel fari arkaĵojn kaj volbojn. La tekniko estis inventita de la romanoj. Do, ni ne povas diri, ke la Panteono en Romo estas pli bona, ol la Partenono en Ateno. Ni povas nur diri, ke la problemo de la arkforma kovraĵo estas pli bona en la romana arkitekturo. Alia ekzemplo: en la mezepoko artistoj ne povis pentri la perspektivon. Pentristoj de la renesanco jam kapablis. En tiu, sed nur en tiu senco ekzemple Leonardo estas pli bona ol la anonimaj pentristoj de la ikonoj.

Do, en nia promenado en la historio de arto mi parolos pri la evoluo de la prezentado de la naturo, sed ne pri la evoluo de la arto mem.


1


2


3

**1. Bildo.** Malmulte ni scias pri la prezentado de la naturo en la antikvaj kulturoj, ĉar el tiu periodo plej ofte nur skulptaĵoj kaj arkitekturaĵoj restas, kaj pentraĵoj malaperis. Ni vidas fragmenton de egipta pentrita planko el la 14-a jarcento antaŭ Kristo. Tio estas bela ekzemplo por la vorto "indiko". La anonima pentristo ne alĝustigis la dimenziojn de la floroj kaj la birdoj. Nur indikis, ke tio estas naturo.

**2. Bildo.** La saman pensmanieron ni vidas ĉe la grekaj ikonoj. Kiel ekskurso ni faras grandan salton, al la 17-a jarcento, sed en la ikon-pentrado la prezentad-maniero en absolute neniu senco evoluis Ni trovis Eliason en natura medio, sed la grava tasko estis lia prezentado. La naturo estas nur por montri, kiuj ili estas.

4


**3. Bildo**. Reirante al la okcidenta arto, post la romianoj ni trovas nin en la mezepoko. Mi montras al Vi la plej faman kaj plej interesan italan mezepokan pentriston: Giotto di Bondone. Tiu fresko troviĝas en la Cappella Scrovegni (Scrovegni Kapelo) en Padova. En la komenco de la 14-a jarcento Giotto plenpentris la tutan internan parton de la preĝejeto, kune kun helpantoj. Sur la bildo de la priplorado de Kristo ni vidas Lin inter Maria, la apostoloj kaj aliaj. Unue ni pensus, ke ankaŭ ĉi tie la naturo havas nur indikan funkcion, sed se ni pli bone rigardas la freskon, ni vidas, ke Giotto faris la linion de la monteto tiamaniere, ke ĝi gvidu niajn okulojn al la vizaĝo de Kristo. La monto fariĝis elemento de, aŭ en la kompozicio.



5

**4. Bildo.** En la urbodomo en Siena, ni trovas la sekvan paŝon en nia historio. Inter 1338-1340 pentris Ambrogio Lorenzetti la alegorian bildon pri la "Efikoj de la bona regado en la urbo kaj en la provinco". El tiu longa fresko mi nur montras la provincan parton. Oni rimarkas, ke li jam interesiĝis pri la konkretigo de la distanco. Kelkaj el la montoj estas malantaŭ la alia. Tiel montris Ambrogio Lorenzetti, ke ili estas pli malproksimaj ol la aliaj.



6

La "ekvilibro" inter la ĉefa temo kaj la natura ĉirkauaĵo aperis ĉirkaŭ la komenco de la 16-a jarcento. Oni vidas, ke la naturo jam ne tute estas subordigita al la ĉefa temo, pli kaj pli ofte ni trovas bildojn, kie la naturo kompletigas la sencon de la pentraĵo. Eĉ, ni povas diri, ke naturprezentado serĉas por si temojn. Temojn, kiel ekzemple la Madono kun aliaj sanktuloj, Rifuĝo al Egiptio, aŭ alegoriaj bildoj.



7

**5. Bildo.** Ekzemple la Madono kun Jesuo kaj Johano de Raffaello. Ni trovas klasikan renesancan kompozicion de la figuroj en bela natura ĉirkauaĵo. La piramida kompozicio de la figuroj denove aperas en la formo de la monto en la fono de la bildo.

8



**6. Bildo.** Se ni saltas ĝis la mezon de la 17-a jarcento. La nederlanda pentroarto havis sian oran jarcenton: la bildo de Salomon van Ruysdael estas bela ekzemplo de la fama nederlanda stilo. Ĝenerala karakterizaĵo estas, ke la horizontlinio estas malalta, tiamaniere ni vidas grandan ĉielon.

**7. Bildo**. Ni absolute devas mencii unu anglan pentriston: William Turner en la komenco de la 19-a jarcento miris kaj pri la belega ludo de suno, akvo kaj pri belaj palacoj en Venecio. Liaj pli malfruaj bildoj jam antaŭsignas la impresionismon.

**8. Bildo.** La impresionistoj trovis ege grava, ke ili montru la ŝanĝon de la lumo en la naturo. Tial ni ofte trovas la saman temon aŭ objekton pentritan en diversaj fazoj de la tago, ekzemple la katedralo de Rouen.

**9. Bildo**. Paul Cézanne jam ellaboris pli prilaboritan, pli pezan stilon. Li konstruis la bildojn el malgrandaj makuloj de pentrado, sed ĉe la fino tiuj vere “konstruas" la vidaĵon.

**10. Bildo.** Ĉu vi rekonas, kiu pentris ĝin? Se ne, mi montras pli facile rekoneblan alian pentraĵon de li. (11). Piet Mondrian ankaŭ komencis sian arton kiel laŭ-natura pentristo (10.), kaj poste li ekinteresiĝis pri la strukturo de la natur-elementoj. Li uzis la liniojn de la arbo, kiel strukturo, rastero, el kiu li evoluigis sian propran, karakterizan stilon. (12.). Tiamaniere Vi certe komprenas lian evoluon.

Naturo donacis siajn formojn, siajn kolorojn, siajn struktur-liniojn, sian “naturan” kompozicion al la artisto, oferis sin por la Arto


Ni povas diri, ke li startis, ekiris el la reala natur-vidaĵo kaj alvenis al nonfigurativa, abstrakta pentraĵo. Sed oni povas ankaŭ tiel esprimi, ke li ekuzis la naturon por trovi sian propran voĉon. Kaj – kiel tria esprimo: Naturo (kun granda No) donacis siajn formojn, siajn kolorojn, siajn struktur-liniojn, sian “naturan” kompozicion al la artisto, oferis sin por la (kun granda A) Arto.




9



10



11



12

# Impresoj de la 56-a KELI-kongreso

## *Naturo kaj progreso – kion toleri*

La 12 – 19-an de Aŭgusto 2006

Els VAN DIJK-KUPERUS, NL

En la montara vilaĝo Strážné en Ĉeĥio proksime al Vrachlabi ĉe la landlimo kun Pollando okazis la 56-a KELI-kongreso. La vilaĝo situas en la montaro Krokonoše, 770 metrojn super la marnivelo. Kiel kongresejo funkciis Horský Domov (Montara Hejmo) ripozejo de la Evangelia Eklezio de Bohemia Kunfrataro. Bone organizis ĝin Pavel POLNICKÝ helpe de sia frato Tomáš kaj Václav POSPÍŠIL. Multaj kongresanoj kunlaboris en la programo kaj tiel kontribuis al la sukceso de la kongreso. La germana orgenisto kaj eklezia muzikdirektoro Ernst LEUZE gvidis la kantadon dum la tuta semajno kaj li regalis nin per orgen- kaj pianludo. Ni estis bonŝancaj ke li denove partoprenis. La kantado el ADORU estis ĉiutaga programero. Ingeborg VAN DIJK instruis la komencantojn jam trian jaron.



**Sabate** vespere kunvenis la partoprenantoj unuan fojon. La KELI-prezidanto Philippe COUSSON bonvenigis nin kaj Pavel prezentis la estrinon de la kongresejo. Horský Domov estis antaŭ la dua mondmilito restoracio de la germanoj. Ĉiuj manĝoj komenciĝis per preĝkanto. La partoprenintoj venis el ok landoj: Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hungario, Nederlando, Rumanio, Svedio, Svislando. La vespero finiĝis per vespera preĝo. Gvidis ĝin Jacques Tuinder.

**Dimanĉe** gvidis Philippe COUSSON kaj pastro Pavel KLIMEŠ la diservon, sekvante la ordon de la reformita diservo (ADORU 084). Philippe predikis. La enspezoj de la monkolekto estis destinitaj por EVIDENTE. La tuta kolektita monsumo inkluzive mondonaco de la sveda sekcio estis 417 eŭroj.


Sekvis la oficiala malfermo de la kongreso. La prezidanto de la LKK (loka kongresa komitato) legis salutleteron de la IKUE-prezidanto Miloslav ŠVÁČEK. Posttagmeze ne povis okazi la planita promenado ĉar pluvegis. Anstataŭ programero estis inter alie grupdiskuto kiun gvidis Éva FARKAS. Ŝi ankaŭ gvidis la vesperan preĝon. Ingeborg VAN DIJK kaj Wil VAN GANSWIJK ludigis la partoprenantojn. Je la 19-a horo komenciĝis koncerto de la ĉeĥa muzikisto Tomáš



NAJBRT. Li estas profesia muzikisto kaj li prezentis programon de malnovaj kantoj sin akompanante inter alie per gitaro kaj liuto kaj aliaj malnovaj instrumentoj. Li kantis grandparte en la ĉeĥa lingvo kaj Pavel resumis la tekstojn esperantlingve. Estis tre bonkvalita kaj sprita prezentado.



**Lunde** gvidis Els VAN DIJK la matenan preĝon kaj Philippe COUSSON enkondukis la kongresan temon. Petr CHRDLE prelegis pri ekoturismo. Posttagmeze prezentis Zoltan SOMHEGYI prelegon kies temo estis: Estetiko kaj evoluo en la naturo-bildoj. La prelego de Václav POSPÍŠIL prilumigis la rakontojn de Krokonoše (Giganta Montaro) kaj Krakonoš. Ni spektis filmojn pri la fabeloj de la figuro Krakonoš. La posttagmeza programo finiĝis per prelego de Petr Chrdle pri la ĉeĥa esperanto-movado. La tri lundaj prelegoj estis vigligitaj per komputila prezentado. Vespere pianludis kelkaj kongresanoj. Matts LANDFORS ludis popolmelodiojn el diversaj landoj, Ernst LEUZE instigis nin diveni kiujn personojn el la kongresanoj li piane prezentis. Ingeborg VAN DIJK ludis du pli modernajn pianpecojn. Matts kaj Anna LANDFORS fermis la tagon per vespera preĝo kies temo estis: Arbo kaj korpo en la Biblio.



**Marde** Éva FARKAS gvidis la matenan preĝon. Post la ĉiutaga komuna kantado prelegis Siegfried KRÜGER pri la temo: La ekologia stato de la mondo. Pavel POLNICKÝ prelegis pri Prĕmysl PITTER, heroo de la amo. S-ro PITTER savis dum la dua mondmilito en sia orfejo ankaŭ germanajn infanojn. La komunisma reĝimo forpelis lin kaj li vivis ekde 1951 ekster la lando.



Muziko ĉiam ludas gravan rolon dum niaj kongresoj. Ankaŭ en tiu ĉi kongreso ni ĝuis bonegan muzikon. Marde vespere koncertis la geedza paro JELINEK el Jilimnice, proksime al la kongresa vilaĝo. La edzo akompanis sian edzinon per gitaro kaj liuto. Ŝi kantis malnovajn kantojn kaj popolkantojn en esperanta traduko. Estis impona prezentado de du afablaj geesperantistoj. Václav POSPÍŠIL gvidis la vesperan preĝon.

**Merkredo** estis la ekskurstago. Britta REHM komencis la tagon per maten-



preĝo. La aŭtobuso ne povis veturi ĝis la kongresejo, tial la plej granda parto de la kongresanoj promenis al Strážné. Tra la montaro veturigis nin la aŭtobuso al Harrachov. Harrachov situas ĉe la landlimo kun Pollando. Ni vizitis vitro-




fabrikon. En la fabriko ni povis rondiri kun gvidantino kaj rigardi la laboron de la laboristoj kiuj faris vitraĵojn. Bohemio estas konata pri tiuj produktoj el vitro. En la vitra muzeo estis ekspozicio de belegaj malnovaj kaj novaj fabrikaĵoj.

Post la tagmanĝo atendis nin malgranda vidindaĵtrajno kun pluraj ĉaretoj. Tiel ni veturekskursis tra la ĉirkaŭaĵo de Harrachov. Ni vidis inter alie la grandegan skisaltejon kaj la akvofalon. La vetero estis bela post tri tagoj de pluvego. La vespero estis libera kaj Pavel KLIMEŠ gvidis la vesperan preĝon.


**Ĵaŭde** matene gvidis Wil VAN GANSWIJK la matenan preĝon. Post la komuna kantado okazis la jarkunveno. Pri ĝi mi poste raportos. La duontaga ekskurso donis al ni la eblecon promeni tra la urbeto Vrchlabi. Je la 17-a horo okazis publika orgenkoncerto en Klášterní Kostel (Kostel estas preĝejo). Ernst LEUZE ludis muzikon de Bach, Oley, Nepomuk David, Mendelssohn-Bartholdy. Estis belega muziko. Vespere bonvenigis la vilaĝestro de Strážné (s-ro SAZEČEK) la kongresanojn. Li iom rakontis pri la historio de la vilaĝo kies nomo signifas "gardisto". Jacques TUINDER gvidis la vesperan preĝon.

**Vendrede** matene prelegis Siegfried KRÜGER pri germana pastoro Dietrich BONHOEFFER kaj Rembrandt VAN RIJN, la pentristo. Jacques TUINDER prezentis poemon de Marjorie BOULTON pri ZAMENHOF nome: La okulisto.

La adiaŭan diservon kun Sankta Manĝo gvidis Philippe COUSSON kaj Pavel KLIMEŠ, kiu predikis. Ni sekvis la







ordon de la luterana Diservo kun Sankta Manĝo el ADORU.

Ingeborg VAN DIJK kaj Zoltan SOMHEGYI gvidis la adiaŭan vesperon (jam



trian jaron). Ingeborg komencis la prezentadojn per pianludo kaj sekvis Matts LANDFORS piane kun popolmelodioj. Irina UDALOVA, akompanata de Matts, kantis rusajn popolkantojn. Wil VAN GANSWIJK montris kiel ŝi instruas gelernantojn per rakonto, kaj kun Siegfried KRÜGER ŝi prezentis ŝercojn. Poste sekvis amuza ludo kun balonoj kaj biskvitoj. Ernst LEUZE pianludis.

La du lastaj eroj estis: ĉeĥa kanto kaj amuza teatraĵo de tri viroj (Philippe, Siegfried, Ernst) pri siaj matenaj travivaĵoj. Karl Heinz SCHAEFFER dankis la LKK kaj la estraron.

Philippe COUSSON dankis la tri membrojn de la loka kongresa komitato: Pavel, Tomáš kaj Vaclav kaj li transdonis donacojn. Philippe finis la gajan vesperon per la vespera preĝo.

**Sabato** estis la tago de la forveturo. Tuj post la matenmanĝo okazis la solena fermo de la kongreso. Nur kelkaj personoj restis por la tagmanĝo. Estas ĉiam malgaja sperto adiaŭi malnovajn kaj novajn geamikojn post unu semajno de komuna kristana kongresado.

Ĝis revido!
Els VAN DIJK-KUPERUS

[fotis la redaktoro]



# Malgranda fotogalerio de la KELI-kongreso 2006 en Strážné, Ĉeĥio







Ĉeĥa biero en restoracio



Aktiva aŭ pasiva ripozo






Kongresejo








Meditado dum pianokoncerto





Survoje al kaj dum ekskursoj



# Unu aĉa vorto

Mu Binghua, ĈN



Ursido eniris en arbetaron, kie kreskis multaj dornarbetoj, kaj ne povis eliri. Arbohakisto preteriranta elsavis ĝin.

Vidinte la ĵusan okazaĵon, ursopatrino tuj diris:

"Dio vin protektu, bona homo! Vi helpis min forte, lasu nin iĝi amikoj. Ĉu bone?"

"Nu, mi ankaŭ ne scias ..."

"Kial?"

"Kiel diri? Eble, ne tro fidi urson. Kompreneble, estas certe, ke tio ne taŭgas por ĉiuj ursoj."

"Je homoj, ankaŭ ni ne tro fidas", la ursino respondis, "same, tio ne pravas por vi."

Sekve la ursino kaj la arbohakisto fariĝis paro de amikoj. Ambaŭ havis bonan amikecon kaj ofte vizitis unu la alian.

Estis vespero. En la arbetaro la arbohakisto perdis direkton. Al li, por trankokti, mankis ejo, do li aliris al la ursina nesto. La ursino akceptis lin dumnokte, kaj lin regalis per abunda vespermanĝo. Matene de la sekvanta tago, antaŭ ol la arbohakisto foriris, la ursino kisis lin, dirante "pardonon al mi, frato! Mi ne donis al vi bonan regalon."

"Ne estu ĝena, fratino Ursino," la arbohakisto respondis. "La regalo estis tre bona. Nur estis iometo, kiu ankaŭ estas sola kaŭzo, ke mi ne ŝatas vin. Tio estas la malbonodoro, eliranta el via korpo."

La respondo malgajigis la ursinon. Ŝi diris al la arbohakisto:

"Haku mian kapon per via hakilo!"

Levinte la hakilon, la arbohakisto per tiu batis malforte sed unufoje.

"Haku forte! Forte!" kriis la ursino.

Finfine, per forto, la arbohakisto hakis foje. La freŝsango ŝpruĉis de sur la kapo de la ursino, tamen la ursino montris nenion, eĉ sen ĝemo. Poste la arbohakisto foriris.

Pasis multaj jaroj. Iufoje la arbohakisto hazarde venis proksimen al la ursonesto kaj vizitis la ursinon. La ursino bonvenigis lin elkore, ankoraŭfoje per abunda manĝaĵo akceptis lin. Kiam la tempo por adiaŭi baldaŭ venis, la arbohakisto demandis:

"Ĉu la vundo tute resaniĝis", fratino Ursino.

"Kio estas la vundo?" la ursino demandis.

"Kiam mi batis vian kapon, mi lasis al vi la vundon."

"O, tio min doloris dum ne longa tempo. Iom poste la doloro malaperis. Post kiam la vundo resaniĝis, mi ĝin forgesis. Sed siatempe vi diris tiun frazon, precipe, tiun vorton, nome "malbonodoro"-n, parolitan de vi mem. Mi neniam kaj neniel forgesos ĝin en mia tuta vivo." ꝏ

# Denove nin vizitis "Evidente"-anoj

*Je la nomo de la plej Bela kaj la plej Pardonema!*

Maja monato por AET-anoj estis bona monato, ĉar nin post du jaroj denove vizitis "Evidente"-anoj el Nederlando, estimata s-ro J. TUINDER kun du bonegaj asistantoj Jerre URSEM kaj Lidia SMIDT-URSEM, kiuj havas honoran celon "Likvidi ne-necesan blindecon". Feliĉe ankaŭ ĉi-foje sincere ĝojigis nin la ĉeesto de estimata Taĝik-Germania afabla e-ino Natalia Rafaelovna KASIMOVA-BREZINSKIJ. Ĉi tempe ili helpis al multege da homoj en 2004-a jaro kaj nun en ĉi-jara misio same ili helpis tre multajn vidhandikapulojn. Ilia helpo inkluzivas: mezuradon de persona vidpovo de malforte vidantoj kaj preparinte personajn okulvitron en NL-o per poŝto ili sendos al NGO "Sigma" kiu estas Taĝikia partnero de Evidente kaj ni ĉi tie disdonos ilin laŭ receptoj, al tiuj kiuj bezonas okulvitrojn por legado kaj ĉiu helpo estas senpaga. Mone ili helpis multajn handikapulojn, sponsoris operaciojn. Ni vizitis diversajn distriktojn kie estas blindulejoj, malsanulejo, maljunulejoj kaj handikapulejoj, blindulentreprenoj ekzemple; Vahdat, Qurganteppa, Ŝahrinaŭ, Regar, Hissar, Javan kaj certe Duŝanbe kaj ni ankaŭ vizitis Prizeneĵhospitalon kie ankaŭ Evidentanoj helpis la samajn homojn kiuj havas vidproblemojn. Samtempe vizitinte la muzeojn ili vidis historiajn heredaĵojn de nia lando kaj unu el la memorindaj aĵoj estas la 12 metrojn alta historia Budho, kiun oni trovis apud Aĝuzateppa en Qurganteppaa distrikto antaŭ nelonge kaj ĉi-Budho apartenas al la 6-8-aj jarcentoj antaŭ Jesua jarkalkulo kaj certe Hissaran fortikaĵon ni vizitis kiu estas parto de la "Silka vojo".

Nia asocio elkore dankas la prezidanton de la fonduso Evidente, estimatan s-ron J. TUINDER pro multegvalora helpo kiu estas ege necesa al nialandaj blinduloj kaj malforte vidantaj handikapuloj (infanoj inkluzive).

Estimata prezidanto uzante la celojn de la "TRI EEE"-uloj ege varmigas la korojn de la milmiloj da homoj el diversaj landoj inkluzive Taĝikio. Verŝajne multaj scias, ke karaj Evident-anoj krom kun Taĝikio havas kunlaboron ankaŭ kun diversaj landoj kaj helpas la samajn handikapulojn, ekzemple en Albanio, Hindujo, Moldavio, Sri-Lanka, Maroko, Rumanio ktp. Ni esperas, ke baldaŭ denove ni renkontos ilin kaj tiam la mision ni dediĉos al nordo de la Taĝikio- Belega Kxodzento kaj aliaj nordaj distriktoj.

En la fino restas al ni nur preĝi kaj peti nian Plejaltulon, ke estu Evidente -anoj sanaj kaj feliĉaj ĉar ili elektis noblan Dian vojon kaj protektu ilin Allah, Amen!

Salutante ĉiujn mi pardonpetas pro erareto kiun mi faris en jena loko de mia artikolo pri Afganio.

+... ke sufiĉas milito, sufiĉas fratmortigado, kial vi mortigas unu la aliajn tiel kiel eĉ bestoj ne faras? "sed tamen tiajn kriojn multaj ne povas aŭdi pro orfeco de la animo"+.

Bonvolu, anstataŭ la vorto *orfeco* legi *SURDECO*! Antaŭdankon / SS

# Baltlandaj Esperanto-Tagoj – 42

Partoprenis Erikas LAICONAS, Estonio

La Baltlandaj Esperanto-Tagoj okazis ĉijare en Estonio. Pli precize – en la plej granda insulo de la insularo en la Baltia maro – Saaremaa. En tiu parto de Estonio estas ĉirkaŭ 1500 insuloj kaj insuletoj kie oni paŝtas ŝafojn. La plej granda insulo estas Saaremaa. Tie loĝas ĉirkaŭ 36 000 homoj. La BET-42 okazis en la sola urbo de Saaremaa – Kuressaare. La urbo estas interesa kun ĉirkaŭ 15 000 enloĝantoj. Dum soveta reĝimo malmultaj homoj povis viziti tiun ĉi belan arbarplenan insulon, ĉar estis malpermesata. Ĉijare ĝi afable akceptis geesperantistaron, entute 135 personoj el 10 landoj.

Veturo al la BET-42 el Litovio estis sufiĉe komplika. Pli frue ni povis veturi per trajno al Rigo kaj vespere al Tallinn. Iun tempon funkciis la trajno Tallinn – Varsovio. De Kaŭno al Rigo trajno ne ekzistas kaj same Rigo – Tallinn. Oni povas veturi nur tra Moskvo. Mi veturis per buso al Tallinn kaj poste per buso de Tallinn al Kuressaare. Se veturi ne sciante, ĉu trovos buson kun libera sidloko, povus veturi de Pärnu al Kuressaare.

Do, mi jam dimanĉe vespere estis en Kuressaare kaj lunde povis interkonsenti kun la loka pastro pri la diservo. La ekumena diservo okazis marde je la 18:00 horo. La diservon partoprenis pli ol 100 personoj. La karavano de Pollando venis pli malfrue kaj partopreni ne sukcesis.

La diserva temo estis pri nuntempa situacio de kristanismo en niaj landoj. La temo, Mar 10:4–9, estis por la ordo de la vivo, kiun nuntempe multoj ne obeas kaj ne praktikas en niaj landoj. Altaraj legaĵoj estis: unue Gen. 2:20–24, kiun legis Aŭgusto Kilk kaj due el la 1-a epistolo de apostolo Paŭlo al korintanoj la 13-a ĉapitro, kiu temas pri la amo. Ĝin legis fraŭlino Stela Kilk.

Mi kore dankas al katolika seminariisto Marius Diglys, kiu helpis al mi kaj al Aŭgusto Kilk kaj lia filino Stela, kiuj legis vortojn de Dio. Post la BET-42 al mi skribis persono el Saaremaa, ke lokaj homoj miris, ke eĉ diservo povas okazi en esperanto.

Sekvontan tagon okazis la oficiala malfermo. Sufiĉe longe esperantlingve parolis la urbestrino. La lingvo estis tre klara kaj bona. Sekvis salutoj de la landaj reprezentantoj.

Dum la tuta tempo de BET-42 funkciis Somera universitato. La prelegoj estis tre interesaj. La salono ĉiam estis plena de aŭskultantoj. Inter alie prelego pri "Harmonio inter homo kaj naturo" de E. Lobjakas. Ankaŭ prelegis A. Kilk pri la perfektiĝo de homo por atingi la regnon de Dio. Kelkaj prelegoj tuŝis la temon pri la nuntempaj problemoj de edukado de la junularo.

Ĵaŭde estis ekskursa tago. Volontuloj povis viziti la interesan kastelon kaj vidindaĵojn de la urbo. Ordinare dum vesperoj okazis artaj aranĝoj dum kiuj kantis kaj dancis reprezentantoj el Estonio, Latvio kaj Litovio.

(La predikon mi publikigos en alia numero /Red)

# Ekumena diservo en Esperanto, en la kadro de al 83-a Germana Esperanto-Kongreso

Raportis Els van Dijk-Kuperus, NL

Dum la semajnfino de Pentekosto okazis ekumena diservo en la Evangelia-Luterana preĝejo "S:ta Ulrici", je distanco de 250 metroj de la kongresejo en la centro de la urbo Braunschweig. La Franciskanoj komencis la konstruadon de la preĝejo inter la jaroj 1240-1250. Ĝia vera aspekto ne plu estas konata. Nur la klostra muro estas ia indikaĵo. Jam en la jaro 1345 oni ekkonstruis novan preĝejon kaj ĝi estis finkonstruita en 1451. En la jaro 1528 eklaboris ĉi-tie la plej intima amiko de Martin Luther (Johannes Bugenhagen) kaj poste venis 2 aliaj konatuloj. En 1944 detruis bomboj grandan parton de la preĝejo kaj de la apudaj preĝejaj konstruaĵoj.

Ĝustatempe je la festado de la 450-a datreveno de la Reformacio (1978) estis la tuta preĝejo rekonstruita.

En tiu historia preĝejo okazis la ekumena diservo. Gvidis kaj celebris pastoro Peter Bäss (nome de KELI) kaj pastro Albrecht Kronenberger (nome de IKUE). Ili kunlaboris en la oferado de la Sankta Manĝo tiel ke ĉiuj samtempe povis partopreni. La eklezia orgenisto akompanis la kantadon. Kontribuis per bibliaj legaĵoj Els van Dijk (Ago 2:1-11) kaj Wolfram Rohloff, la prezidanto de la germana KELI-sekcio (Joh 14:13-27). Ĉirkaŭ 50 kongresanoj ĉeestis la diservon. Gvidlibro estis la ekumena diserva libro "ADORU".





# La Ekumena Diservo dum la UK en Florenco, Italio

Raportis kaj fotis: Benata Hengstmengel-Koopmans, NL

Dum la ĉi-jara Universala Kongreso en Florenco je dimanĉo la 30an de julio okazis Ekumena Diservo en la Baziliko de Sankta Laŭrenco. En la kongreslibro estis foto kaj klara priskribo de la situo de la preĝejo, kio verŝajne kaŭzis ke ĝi estis plenplena kun pli ol 400 gekongresanoj. Aparte menciinde estas ke la preĝejo estis malfermita nur por tiuj kiuj aliĝis al la UK.

En la preĝejo estis disdonitaj malgrandaj folioj kun la Ordo de la Diservo, uzebla kune kun la Ekumena Diserva Libro ADORU, kiuj estis antaŭe disdonitaj ĉe la sidlokoj.

Oni kantis *Krist Jesu', frato amik'* (ADORU 431:1-4), *Ho granda Dio* (ADORU 455:1-5), *Psalmo 23* (ADORU 011.7/8) kaj *Nun Dio danku ni* (ADORU 453).


Legataj estis la Bibliaj tekstoj: 2 Reĝ 4:42-44, Efe 4:1-6 kaj Joh 6:1-15.





La Diservon gvidis la past(o)roj Bernard Eichkorn (Germanio) kaj Gerrit Berveling (Nederlando), dum Stefano Hawkes Teeples SJ predikis. Post la Ekumena Diservo okazis aparta Sankta Meso.

ဢ



# La KELI-IKUE kunveno dum la 91a UK en Florenco, Italio

Raportis kaj fotis: Benata Hengstmengel-Koopmans, NL

Dum la Universala Kongreso en Florenco je lundo la 31an de julio posttagmeze okazis Kristana kunveno de KELI-IKUE, je tre favora tempo por la plejmulto el la multaj interesitaj kongresanoj.

Gvidis la kunvenon pastro Bernhard Eichkorn (Germanio), kiu rakontis pri diversaj eldonaj projektoj kaj speciale reatentigis pri Adoru "la perlo de la Esperanto literaturo". Li vendis ankaŭ kompakt-disketojn kun muziko kaj bibliaj tekstoj aperantaj en Adoru, kiuj multe tro rapide elĉerpiĝis.

Gerrit Berveling (Nederlando) prezentis la projekton pri la nova traduko kaj re-eldono de la tuta Biblio en Esperanto.

Maria Beloŝevic (Kroatio) kaj Carlo Sarandrea (Italio) raportis pri la agado de IKUE, kaj speciale pri la ĵus okazinta kongreso en Ĉehio.

Ankaŭ kelkaj aliaj ĉeestantoj parolis pri la Kristana Esperanto-movado en siaj landoj. Oni komune kantis el Adoru.

Je la fino eblis spekti parton de televida elsendo pri vizito de la Papo al la Esperanta sekcio de la Itala Radio. Montriĝis ke la Papo scias pri Esperanto kaj estas tre interesita.




---

## La historio de KELI - daŭrigo de "Nia historio"

Post du jaroj nia gazeto celebros sian 100-jariĝon, kaj en 2011 nia KELI-organizo havos sian. Mi ŝatus proponi ke ni jam nun komencu kolekti informojn por ke ni povu publikigi kaj en Dia Regno kaj en formo de libro – eble daŭrigo de "Nia historio", kiu priskribis la tempon ĝis 1961. Se vi havas ideojn kaj materiojn indiku al mi kaj mi volonte komencos kolekti la materion!

Bengt Olof Åradsson, redaktoro

# ARTA ESTRARANO

Zoltán SOMHEGYI

Karaj gefratoj! Mi pensas, ke multaj KELI-anoj jam konas min persone el kongresoj, aŭ "virtuale" pere de Dia Regno.

**Mi nomiĝas** Zoltán Somhegyi. Mi naskiĝis en 1981 en Budapest, Hungario. Mi ne memoras ekzakte, kiam mi esperantiĝis, sed mi certe scias, kiu estis mia unua instruistino: ŝi estis mia avino, Éva Farkas-Tatár. Ŝi invitis min al mia unua Esperanto Kongreso en Velence, kiam mi havis eble nur 11 jarojn. Kompreneble mi ankoraŭ ne flue konis la lingvon, sed la ideo ege plaĉis al mi, ke homoj el multaj landoj povas interkonsenti en la sama medio.

**Poste mi plurfoje veturis** al kongresoj, kaj komencis plue lerni la lingvon. Mi ĉeestis en la UK en Tampereo kaj en Prago. Sed, mi preferis niajn KELI kaj Ekumenajn kongresojn, ĉar kun pli malmulte da homoj mi povis pli bone interkonatiĝi. Dank' al la esperantistaj amikoj mi plurfoje povis viziti fremdajn landojn, kiel ankaŭ multaj gefratoj vizitis min en Hungario.

**Mi estis elektita estrarano** de KELI dum la kongreso en Zagrebo en 2001, pere de la propono de nia kara Adolf Burkhardt. Ekde tiu dato mi estas fiera estrarano de nia organizaĵo.

**La internacia lingvo** ankaŭ en "nerekta" maniero helpis min en mia vivo: post Esperanto mi multe pli facile povis lerni aliajn fremdajn lingvojn; la anglan, la francan, la germanan kaj la italan. Mi pensas, ke la internacia lingvo estas bona bazo por aliaj lingvoj. Tiujn mi bezonas por mia laboro.

**Mi estas arthistoriisto**. Mi finis la universitaton en 2006. Dum la lernojaroj mi dufoje ricevis stipendiojn al Italio, en 2004 mi estis en Venecio, kaj en 2005 en Bologna (Bolonjo), kie mi renkontis italajn samideanojn.

**Ekde tiu ĉi semestro** mi komencas miajn doktorajn (PhD) studojn. Mia temo estas germana artfilozofio de la 18a-19a jarcentoj. Apud tiuj studoj mi komencis labori: mi instruas en diversaj lernejoj, kaj mi skribas artkritikojn kaj eseojn pri artaj temoj. ✤



# Selektitaj memortagoj 2006

Listo kompilita de Siegfried Krüger, DE

(NT = naskiĝtago; MT = mortotago)

- 500-a MT Christoph Kolumbus 1451 – 21.05.1506

  *Famaj samtempuloj:*

| | |
|---|---|
| Jonannes Gutenberg | 1398 – 1468 |
| Leonardo da Vinci | 1452 – 1519 |
| Albrecht Dürer | 1471 – 1528 |
| Lucas Cranach | 1472 – 1553 |
| Michelangelo Buonarotti | 1475 – 1564 |
| Raffael | 1483 – 1520 |
| Martin Luther | 1483 – 1546 |

- 460-a MT Martin Luther
  10.11.1483 – 18.11.1546 (AD 369, 439)
- 400-a NT Rembrandt Hermenensz van Rijn
  15.07.1606 – 04.10.1669 (AD 147)
- 250-a NT Wolfgang Amadeus Mozart
  27.01.1756 – 05.12.1791 (AD 627)
- 150-a MT Heinrich Heine
  13.12.1779 – 17.02.1856
- 100-a NT Dietrich Bonhoeffer
  04.02.1906 – 09.04.1945 (AD 490)

*Rimarko:*

En libro de la 100 plej influriĉaj personoj de la mondhistorio estas


| | |
|---|---|
| Kolumbus | rango 9 |
| Luther | rango 29 |
| Beethoven | rango 45 |

Mozart kaj Rembrandt estos inter la 200 plej influriĉaj personoj,

| | |
|---|---|
| Mohamedo | rango 1 |
| Newton | rango 2 |
| Jesuo | rango 3 |

# Biblio-lingvoj mondvaste

Komunikis la Mondligo de Bibliosocietoj en Reading (Britio). Ĝi estas kunigo de 137 naciaj bibliosocietoj. Estas subtenataj ankoraŭ 600 tradukprojektoj en 495 lingvoj. Do la bildo provas, laŭ grandeco, ilustri en kiom da lingvoj la Biblio estas tradukita.



# *Intervjuo kun s-ro Leen Hordijk.*

(nask. 22-10-1926)

Intervjuis Els VAN DIJK-KUPERUS, NL

*La 30-an de marto mi vojaĝis al la hejmo de Leen kaj Sietske Hordijk en Oss. Leen estas la iama kasisto de KELI kaj la antaŭulo de Siegfried Krüger. Mi intervjuis Leen pri lia vivo kun Esperanto.*

*Kiam vi konatiĝis kun Esperanto?* En la jaro 1966 mi havis kontaktojn kun Jan Kalkman en mia loĝloko Vlaardingen. Li estis magazenisto de la ilarmagazeno de la granda oleokompanio Shell. Kiel profesia asistanto de la interna revizoro mi devis kontroli stokojn de la magazeno. Jan donis al mi Esperanto-lernolibron kaj li korektis miajn lecionojn. Mi rapide progresis. En 1973 elsendis la Instrua Servo de la televido, nomita TELEAC, plurmonatan, amuzan televidan Esperanto-kurson. En ĝi ludis du junaj, nuntempe ege konataj Nederlandaj kabaretistoj. Post tiu kurso mi plenumis la Elementan Ekzamenon kaj mi ricevis la Elementan Diplomon.

*Kiel vi konatiĝis kun KELI?* En mia loĝloko Vlaardingen estis persono kiu daŭrigis la instruadon de la televidkurso por la gelernantoj. Mi aliĝis. La instruisto estis Jan van Keulen, tiutempe li estis la redaktoro de *Dia Regno*. Jan kaj Mien van Keulen akceptis la gelernantojn. En tiu rondo mi konatiĝis kun Gerrit Berveling kaj Madzy v.d. Kooij. Ni regule kunvenis kaj fojfoje ni eĉ tradukis literaturaĵojn kiuj poste aperis en Dia Regno.



*En kiu jaro vi unuan fojon partoprenis internacian Esperanto-renkontiĝon?* En junio 1976 mi jam pensioniĝis pro invalido post korinfarkto kaj diabeto. En septembro Sietske kaj mi vojaĝis al Svislando. Svisaj fervojistoj organizis Esperanto-ferion en Maglasio apud la Lago de Lugano en feria domo de la Evangelia Eklezio. Tie mi konatiĝis kun geedzoj Liechti. La duan semajnon mia edzino kaj mi pasigis helpe de Fritz Liechti en Agno.

*Kiam vi partoprenis vian unuan KELI-kongreson?* Mia ununa kongreso estis la Ekumena Kongreso de KELI kaj IKUE en nia lando en Dalfsen. En 1975 mi jam aliĝis al KELI kaj KUNE. (la Nederlanda sekcio kies kasisto mi fariĝis). En la jaro 1983 dum la Ekumena Kongreso en Esztergom-Kertváros (Hu) mi postsekvis André Bachelier el Francio kiel kasisto. En la jaro 1998 postsekvis min Siegfried Krüger, la nuna kasisto.

*La sanstato de Leen ne plu permesas al li partopreni kongresojn. Mi estas certa ke multaj malnovaj membroj rememoras lin kaj lian edzinon kiu ĉiam akompanis lin.* ೩

# Informetoj

Karaj,
mi post longa tempo vizitis Vikipedion kaj denove admiris ĝian riĉecon. Speciale, kion IKUE publikis pri nia kara Adolf Burkhardt kaj mi iomete fieras, ke mi siatempe kontribuis per tradukoj de la vizitleteroj de Walter Gölz. En Vikipedio aperu paŝo post paŝo ankaŭ nia historio!

Salutas korege
Siegfried

Se vi havas eblecon, vizitu:
http://www.ikue.org/historio/burkhardt.htm#interreto
http://eo.wikipedia.org/wiki/Adolf_BURKHARDT



La 7an de septembro 2006 geedziĝis Ingeborg van Dijk kaj Ziko Marcus Sikosek (nun: Ziko van Dijk). Ŝi iam prezidis nederlandan E-Junularon, li iam estis inter alie oficisto de UEA. La ŝtata ceremonio kaj la festaĵoj okazis en malgranda familia kaj amika rondo, en la nederlanda urbeto Varsseveld.

*Ingeborg kaj Ziko van Dijk*

## Louise van der Pauw-Kuiper



La 19-an de julio 2006 forpasis en la aĝo de 76 jaroj s-ino Louise van der Pauw-Kuiper en Voorburg, Nederlando.

Sur la anonckarto estis skribita: “Ni estas malĝojaj, hodiaŭ forpasis nia patrino, bopatrino kaj avino. Ŝi tre multe signifis por ni kaj por multaj ekster la familia rondo”.

Louise estis vidvino de Jan van der Pauw.


Ŝi mortis tre neatendite. Dum ekskurso ŝi perdis la konsciencon kaj en la malsanulejo la kuracistoj ne povis savi ŝian vivon.

Louise estis antaŭ multaj jaroj la matrikulisto de KELI. Mi konatiĝis kun ŝi en kunveno de la Nederlanda sekcio. Dum la lastaj jaroj ŝi malofte vizitis kongreson. Ŝi profesie instruis la francan lingvon.

Mi rememoras ŝin kiel afabla virino kiu bone parolis Esperanton.

*Els van Dijk-Kuperus*

*Eltiraĵo de poŝtkarto al nia kasisto.*



Estimata sinjoro Siegfried!

... Niaj esperantistoj (ankaŭ en Bjelorusio kaj Kazaĥio) legas la “Dian Regnon”. Tie estas interesaj kaj utilaj informoj, kiuj estas utilaj ankaŭ por miaj gelernantoj, ĉar nun mi instruas Esperanton al la studentoj de nia loka pedagogia akademio (en la fakultato de aldonaj profesioj).

Kun bondeziroj kaj amikaj salutoj -
Larisa [Kuzmenko]

# Trans imag' Jesu' amikas –

# What a friend we have in Jesus

Trans imag' Jesu' amikas -
kia la privilegi',
ke li portas nian ŝuldon.
1 Preĝe donu ĝin al li.
Kiom ni disipas ŝancojn
pri anima harmoni',
sole ĉar ni rezignadas
preĝe turni nin al li.

En danĝero kaj aflikto,
tento kaj eĉ tragedi'
ni neniam malesperu.
2 Preĝe prenu ĝin al li,
la fidela akompano.
Amikec' ne eblas pli.
Konas li malforton ĉiun,
preĝe portu ĝin al li.

Zorgoŝarĝo ofte pezas,
kaj senfina la defi'.
Ĉion la Savant' superas.
3 Preĝe fuĝu ni al li.
Se forturnas sin amikoj,
preĝe diru ĝin al li.
Vin konsole ĉirkaŭbrakos
la Unika sen kopi'.

Vi, Savant', promesis porti
ŝarĝojn niajn tie ĉi.
Tial ilin ni demetu
4 ĉiujn preĝe nur ĉe vi.
Baldaŭ preĝoj ne necesos
ĉe la brila tron' de Di'.
Ĝis etern' ni restos rave
en ador' kaj laŭd' al Li.

Originalo: What a friend we have in Jesus
Verkis (angle): Joseph M. Scriven, 1855
Esperantigis: Reinhard Pflueger, 2006
Melodio: Charles C. Converse, 1868

Vizitu ankaŭ la *TTT-Himnaro Cigneta* por aŭskulti la melodion:
http://www.geocities.com/cigneto/thctxt/t/transimag1.html